

N° 06 1968

G.L.GIMELLI

# ITALA fervojisto

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti





IFEA

## BONDEZIROJ

Okaze de la venontaj festoj, la estraro de Itala Fervojista Esperanto-Asocio "I.F.E.A." kaj la redakcio de "Itala Fervojisto", varme bondeziras feliĉan Kristnaskon kaj prosperan Novjaron al ĉiuj membroj kaj simpatiantoj de nia Asocio. Korajn bondezirojn ankaŭ al estraro de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio "I.F.E.F." kaj al la tuta anaro kaj legantaro en ĉiuj landoj.

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

U.A.I.C.F./F.F.E.A. **21-a I.F.E.F.-KONGRESO** F.I.S.A.I.C.

AVIGNON (Francio) de la 17-a ĝis la 23-a de majo 1969-a

DIVERSAJ INFORMOJ PROVIZORAJ

Oficiala Adreso: 21-a IFEF-Kongreso, 15 rue Guillaume Puy, F-84 AVIGNON.
Banko: Banque Nationale de Paris, 39 Rue de la République, F-84 AVIGNON.
Kontonumero: C.H. 072.574 - Congrès des Cheminots Espérantistes.
Poŝtĉekkonto: Banque Nationale de Paris-Avignon. Konto n-ro: "13.381 Marseille". Aldonu: Compte C.H.072.574-Congrès des Cheminots Espérantistes.
Kongresejo: Palais de Champfleury, AVIGNON.
Kongres-kotizo: Ĝis la 15-a de januaro 1969-a: 36 francaj frankoj.
" " 15-a de marto " : 44 francaj frankoj.
" " 20-a de aprilo " : 50 francaj frankoj.
Pensiuloj, familianoj, junuloj malpli ol 28 jaroj pagas la duonon. Ĉiuj aliĝoj devas atingi L.K.K. plej malfrue la 20-an de aprilo 1969-a.
Simbola aliĝo: Minimume 12 francaj frankoj. Tiuj personoj ricevos unu folion da glumarkoj kaj laŭeble kongresinsignon kaj kongreslibron.
Ekskursoj:
A)- Tuttaga ekskurso per aŭtobuso al suda marbordo tra Kamarga regiono kaj kun vizito de urbo ARLES. Prezo 38 F.F. inkluzive tagmanĝon.
B)- Duontaga ekskurso per aŭtobuso al FONTAINE-DE-VAUCLUSE kaj vizito de urbo ORANGE. Planita vendrede. Prezo 10 F.F.
C)- Duontaga ekskurso per aŭtobuso al urbeto UZÈS kaj PONT DU GARD (famkonata romia akvedukto). Planita lunde. Prezo 5 F.F.
Manĝado: Prezfavoraj manĝoj kun trinkaĵoj riceveblaj kontraŭ kuponoj aĉeteblaj en la kongresejo, po unu: 8 F.F. (ĉion inkluzive).
Bankedo planita marde tagmeze en la kongresejo je la prezo de 26 F.F.
Loĝiĝo: L.K.K. rezervas ĉambrojn por aliĝintaj kongresanoj kiuj pagis la ĉambroperadon de 2 F.F. po lito. Diversaj kategorioj de 12 ĝis 30 F.F.
Komuna loĝejo en kulturdomo (limigitaj lokoj): 4,30 F.F. po lito.
Filmvespero: Bela filmo pri la regiono titolita "Images rhodaniennes" (rodanaj bildoj) kaj tri interesaj fervojaj kolor-filmoj temantaj pri la francaj rapid-trajnoj kaj iliaj elprovoj.
Glumarko: La koloro estas verda, krom la centra bildo, kiu estas nigra kaj temas pri la konata Avinjona ponto, la Papo-palaco, la monto Ventoux (prononcu vantu). Kosto 0,10 F.F. po unu peco.
Teknika vizito: Planita marde matene en la lokomotiva remizo.

## LA PROVENCA SKOLO EN LA SKULPTARTO DE FRANCLANDO

Nur supraĵe ni povos kontempli la francan, ĉefe la romanikan skulptarton...artistaj laborlokoj, skoloj organiziĝis kies modeloj ofte imititaj aperis diversloke.... La kaŭzoj de tiu radiado kaj influo estis diversaj: la iniciatoj de bonfarantoj, de Episkopoj aŭ Abatoj kiuj deziris beligi iliajn preĝejojn (ĉar kelkaj revis antaŭ la riĉaj temploj grekaj, romiaj, eĉ duonruinigitaj), ankaŭ la ekonomiaj kaj materialaj faktoj, kiel la prospero de iu regiono kaj ĉefe la kvalito de subgrundo, kies ŝtonoj povis taŭgi al skulptado de animitaj figuroj!

Sed tiu arto, jam prosperplena, komence de nia kristana erao, tute mal

aperis kiam la barbaroj invadis, bruligis, detruis ĉion, eĉ kaj ĉefe, ĉion faritan dum la pactempo de la romia imperio; en la daŭro de ĉ. 5 jarcentoj regis tiu prospertempo. Estas ja afero de arkeologoj retrovi peeojn post peeoj... Tamen, la skulptarto ne estis tute neglektita, dum tiu ĥaosa periodo (ĉ. 700 jaroj); de la 4-a ĝis la 6-a jarcentoj, diversaj desegnaĵoj= geometriaj motivoj, stilizitaj kreskaĵoj, helicoj, plektaĵoj, rozacoj, ornamis la panelojn de sanktejoj, la katedrojn, la pilierojn, eĉ la fenestrojn. La merovida epoko ornamis ĉefe la sarkofagojn, ofte el la plej belaj marmoroj; aliaj ellaboraĵoj kiel mozaikoj, pentrataj vualoj, surmuraj pentraĵoj, miniaturoj fare de monaĥoj sur la liturgiaj libroj, disvolviĝis; sed estis nur desegnarto kiu inspiris la romanikajn skulptistojn tra tiu harmonia simetrio, kvankam ĝi ne donis la volumenon de la figuroj kiun ili serĉis. La karolidaj artistoj atingis, en tiu kurioza desegnarto, mirigan perfekteeon, kiun la romanika epoko ne multe kopiis.

Je la 10-a j.estis kelkaj provetoj, hezitemaj, por prezenti personaĵojn gravuritajn aŭ pli ĝuste apenaŭ reliefigitaj, tio estis nur <u>elkavigo</u> de la ŝtono ĉirkaŭ la rezervitaj siluetoj! Jes, ja, bezonis atendi la 11-a J. kiam la ŝtontranĉistoj denove malkovris la manieron <u>animi la ŝtonon</u>! La unuaj fakte estis mallertaj, ne graciaj, sed por ni tre interesaj pro tio.

La 11-a j. por nia Historio, estis grava jarcento (politike, religie, arte) Francelando estis ankoraŭ tiel juna nacio: ĝia karaktero maturiĝis sen perdi, ĝis nun, la ĉefajn trajtojn, spite ĉiujn malhelpojn, ĝiajn malamikojn, eĉ ankaŭ spite ĝiajn amikojn kiuj nepre volus ke ĝi estu laŭ lia imago, kio tute ne taŭgus al tiu preciza karaktero.

La galantaj moroj je honorloke, la kapetida dinastio firmiĝante, same la franca Eklezio, pro tio "nia lando vestiĝis per multaj blankaj preĝejoj". La Kluniza Ordo, kiu ĝis la jaro 1000, ĉeestis nur en Burgonjo, al ĉiuj direktoj starigis priorejojn, preĝejojn, (tiu de Cluny(kluni) estis la plej granda de la kristanaro). El tiu ordo, la Cistercioj pli disvastiĝis, eĉ tra tuta Eŭropo kaj rilate artojn (romanikan poste ogivan) oni nomis ilin "La Misiistoj de la franca arto"! Samtempe ekestis la pilgrimoj, ĉar kutimiĝis konstrui la katedralojn, la monaĥajn preĝejojn sur la tomboj de la Sanktuloj, miraklofarantoj! Tial survoje al pilgrimado (ĉefe al Sankta Jakobo en Campostel) leviĝis la plej belaj, grandaj romanikaj preĝejoj...ĉar malavare donacis la pilgrimantoj, ankaŭ la arda fido kaj la paco de tiu 11-a j....ĉio ĉi tion permesis...

La unuaj romanikaj skulptistoj inspiriĝante el ĉiuj plej diversaj modeloj, provoj post provoj, baldaŭ sukcesis retrovi la skulptarton de <u>plena reliefo</u>. Plie, la artistoj ricevis konsilojn, pri la temkomponado, de kleraj teologoj, kiuj klarigis la gravajn temojn de Kristana Religio, samkiel epizodojn de la Malnova Testamento, el la vivo de Sanktuloj...

Sed...la fantazio de tiaj artistoj esprimiĝis unue en la ornamo de la timpanvolbiĝoj, kapiteloj, frisoj, ofte ili pruntis fabelajn bestojn, bildojn el la plurjarmila orienta arto... Post la unuaj paŝoj, la plena reliefarto evoluis al perfekteco...tro ofte oni juĝis serviteco kopiitajn, liajn spontanajn trovaĵojn...ĉar tre malofte niaj landaj artistoj trudis al si kopii iun ajn modelon, kontraŭe, ili interpretis plej libere ĉiun temon, tiom pli ke ili ne vidis la printempajn personojn, tiel ke iliaj ĉefverkoj estis stampitaj de ilia persona talento, ĉar ili eksteriĝis sian propran stilon rilate la materialojn, la klimatojn, la prapatrajn tradiciojn, ankaŭ la temperamenton. Ekzegezistoj vidis en tiuj multaj fantaziaĵoj, <u>bildojn de pekoj</u> malpurajn pensojn kiujn demonoj prezentas al la homoj...povas esti certa kelkaj el tiuj bildoj esprimas dogmojn...sed plej ofte, tiuj bildoj estas eksplodo de la galla verko kaj gaja trafo de artisto; ĉar la franca spirito ĉiam sciis asocii al la plej profunda penso, la neŝanĝeblan bonhumoron! Tiuj du aspektoj de la romanika arto: unu, serioza, tima, enpensiĝanta antaŭ la grava problemo de postmorto kaj Di-mistero, alia, plena de juneco, facilanima pureco, amuziĝante je plaĉaj figuroj, karikaturoj, ambaŭ aspektoj miksiĝas sen ekbati la harmonion de la

liniojn de la Arkitekturo, kiun subtenas kaj ornamas la Skulpturo.

Tra diversaj, provincoj, la arkeologoj distingis plurajn tipajn skolojn, inter ili: la Provenca Skolo kaj ĉefe tiu de Arles (arl) prezentiĝas sufiĉe grava; post longa argumentado, oni akordiĝis pri ĝia starigo en la lastaj jaroj de la romanika stilo, fine de la 12-a jarcento.

Malfruigis alvenon la barbaroj, al Rhône-baseno! Povas esti hazardo, sed eble tio permesis konservadon en sufiĉe bona stato, kelkajn el la antikvaj monumentoj, t.e.: teatroj, amfiteatroj, temploj, triumfarkoj, pontoj, banejoj, vilaoj, kelkajn el la unuaj kristanaj konstruaĵoj, la baptejoj, kiuj prezentis al artistoj de la tiea skolo, la admirindajn modelojn de la antikva beleco de la vizaĝoj, la mirindaj vestaĵoj...

Tiu provenca skolo romanika, sorbigita de Galla-romia antikveco realigis inter aliaj, du ĉefajn belaĵojn: Saint Gilles (sin ĵil) du Gard, Saint Trophime (trofim) d'Arles; ni povos aludi aliajn ĉefverkojn, en la ĉirkaŭaĵo, en regiono Hérault (ero) proksime, ĉar jam la valoraj marmoraj minejoj estis ekspluataj... Saint Guilhem-le-Désert (sin gilem lö dezer) abatejo, kiu enriĉiĝis, fine de la 12-a j. je belegaj kapiteloj. La friso de Nîmes-katedralo, la portalo de Saint Bernard en Romans, de Thines; la kapiteloj de: Sainte Marthe en Tarascon, de la preĝejo Saint Sauveur Aix-en-Provence, katedralo de Vaison-la-Romaine, tiuj de la klostroj de: Saint Ruf kaj Notre-Dame des Doms en Avignon; tiuj ĉi kapiteloj kun tiuj de Saint Guilhem, nuntempe troviĝas poparte en diversaj muzeoj: Musée Calvet en Avignon, musée du Louvre en Parizo kaj eĉ en "Fogg Museum de Cambridge"-U.S.A.!

Laŭ plano de la unuaj bazilikoj, kun larĝaj navoj, la preĝejoj de la provenca skolo, iom majesteco, kiel la antikvaj monumentoj, havas nek flankaĵojn, nek tribunojn, triforion, nur sur la muroj modlurita bendo, nek ambulatorion kaj foje nek transepton; la sonorilturoj estas fortikaj kvadrataj turoj, la tegmentoj estas terasoj. La simpleco de tiuj rektaj linioj estas kompensita per la riĉeco de l'aparato, kalka aŭ marmora je granda amplekso, realigita kun rara perfekteco kies ornamo inspiriĝis el Galla romia arto. Rimarkinde estas la katedraloj d'Agde, de Maguelonne kun iliaj dikaj altaj muroj, krenelo j, embrazuroj, fortikaj preĝejoj samkiel la tre bela preĝejo de "Saintes Maries de la Mer"; ties krenelita abside superita per kapelo -iam estis patrolvojeto- donas militan aspekton kvazaŭ ĉefturo de fortreso!

La gotika stilo aperis fine de 13-a j. kaj dum la 14-a j. ĝiaj ĉefverkoj ne estis religiaj; la muroj gardas romian aŭ grekan majestecon. La granda sunlumo alvokas la longajn purajn liniojn; tial, en Provenco daŭris la romanika stilo, sed kiam al ĝi kunuiĝis la gotika, aperis tre nobla arto, mirinda kiel oni vidas en la Kastelo de la Papoj...kelkaj nobeldomoj en Avignon...

<u>SAINT GILLES DU GARD</u>- estis feuda urbo de Langvedoko. La fasado de ĝia preĝejo estas fambelega ĉefverko, eleganta kaj harmonia; ĝi konsistas el centra, granda portalo, flankita per du pli malgrandaj; 6 grandaj kolonoj eliras de la planko, bela kornico kie randiras maskaronoj kaj pasantaj bestoj (kvalita laboro), dekkvar altaj statuoj, la piedoj sur kaŭraj leonoj kiuj ŝiras per ĝiaj ungegoj kaj manĝas homojn, bestojn...Malantaŭ la absido, en tureto, estas videbla la faman "Vis de Saint Gilles (helika stupareto) kiun nepre vizitis kaj ankoraŭ vizitas la manlaboristoj pri konstruo, dum ilia Francrondirado.

<u>SAINT TROPHIME D'ARLES</u>- ĝia fasado de la 12-a j.analoga al tiu de St.Gilles, estas malpli ampleksa, nur unu portalo; la materialo ne estas tiel bela, la laboro ne estas tiel zorgita, ne donas la impreson de superbela kaj riĉa arto. Nur la timpano estas el vera beleco; la friso prezentas unuflanke la elektitojn, aliflanke la damnitojn, ambaŭ grupoj vieiĝas en ia monoteco. La pordo estas kadrita per dek paneloj kaj naŭ statuoj.

Studaĵo de JULIETA

## FARIĜU ADOPTANTO DE KOLEGO POR I.F.E.F.

Grandaj estas la devizaj baroj por niaj kolegoj en orientaj landoj. Ĉiu el la tieaj Asocioj nur por parto el siaj anoj povos transpagi kotizojn al okcidenta lando. Similajn malhelpojn ni konstatas por interesuloj en Hindujo, Maroko kaj aliaj subevoluitaj landoj. Tamen, ĉie IFEF devus starigi kernon, el kiu povas evoluiĝi landaj asocioj. Ni ja sendas al are el ili nian organon. Sed, estus por multaj kolegoj honoro, fariĝi membro de IFEF. Tio sendube fortigus ilin en sia agado por la internacia lingvo.

Pro tio la IFEF-estraro vokas al solidareco kaj kore petas gekolegojn en pagipovaj landoj pagi la IFEF-kotizon por unu aŭ pluraj kolegoj en nepagipovaj landoj. Se eblas promesu tion por 2 - 3 jaroj eĉ. Laŭeble la IFEF-kasisto informos vin pri la nomo de la adoptota kolego por ke vi havu kontakton kun li. La pojara adopta kotizo estas svisaj frankoj 3.

Imagu, per rezigno je 2 pakaĵetoj da cigaredoj aŭ je alia frandaĵo vi faras servon al kolego kaj kunhelpas plievolui IFEF-on.

Ni dankas al via landa asocio, ke ĝi pretas peradi al IFEF vian adoptan kotizon. Uzu multnombre la eblecon pagi al: I.F.E.A.-Via Donato Creti, 61 -I-40128 BOLOGNA, poŝtkonto 8/24094 la sumon de 500 italaj liroj por tiu solidareca celo.

Otto WALDER, IFEF-kasisto, Esperantoweg -CH 8590

## NOVA ESTRARO DE GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO "G.E.F.A."

La 12-a Jarkunveno de Germana Esperanta Fervojista Asocio okazis de la 11-a ĝis la 13-a de oktobro 1968 en NEUSTADT (Weinstrasse). Partoprenis 140 fervojistoj, kelktempe 200 personoj, el 7 landoj. Plej grava punkto de la kunveno estis la ŝanĝoj en la estraro. Kiel novaj estraranoj ekoficas: Prezidanto: Willi BRANDENBURG, Münster (adreso 4401 Westbevern vadrup 276 Germanio). 1. Sekretario: Otto RÖSEMANN, Osnabrück (adreso 45 Osnabrück Kokschestrasse 44 Germanio).

Ni atentigas pri la ĝojiga fakto, ke la germana fervojista sindikato GdED aliĝis al GEFA kiel korporacia membro.

Otto Rösemann

## D E Z I R A S   K O R E S P O N D I

- S-ro Antono JÁRO, Közép utca 35, NYIREGYHÁZA, Hungario. Li ŝatus kontaktiĝi kun fervojistoj por interŝanĝi leterojn kaj bildkartojn, kaj scii kiel ili vivas por pruvi la utilecon kaj taŭgecon de Esperanto.
- D-ro YOSIHARU SINDO, Japana kuracisto, Sizuoka-ken, Kan-Nami-mura. JZU-TEISIN-CYOIN KANSYA (Japan-Japanio).

## E S P E R A N T O   E N   L A   R A D I O

RADIO ROMA - ESPERANTO- Casella postale 320, I-00100 ROMA (Italio). La dissendoj okazas de h.21 ĝis h.21,20 (M.E.T.). Ondlongoj: metroj 30,90; 41,24 kaj 50,08. Redaktoro: Luigi MINNAJA. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de E.", la dua parto al la ĉi subaj temoj:

JANUARO 1969-a: 2185 dimanĉon la 5-an: Tra la literaturo. 2187 dimanĉon la 12-an: Novaĵoj el Italujo. 2188 dimanĉon la 19-an: Italaj kanzonoj en Esperanto. 2189 dimanĉon la 26-an: Leterkesto.

FEBRUARO 1969-a: 2190 dimanĉon la 2-an: La manĝoj ĉe la antikvaj Romianoj. 2191 dimanĉon la 9-an: Kasteloj ĉirkaŭ Saluzzo. 2192 dimanĉon la 16-an: La glora italino Eleonora d'Arborea. 2193 dimanĉon la 23-an: La kampanilo de Sankta Marko en Venecio.

## RENKONTIĜO ĈE HOTELO "ESPERANTO" EN CERVIA (ITALIO)

La 8-an de septembro, geesperantistoj de la Bologna Grupo kaj de I.F.E.A. vizitis hotelon "ESPERANTO" en Cervia (Viale dei Mille, 84) kie renkontis geesperantistojn el 6 landoj. La unuranga restoracio kunigis la partoprenantojn kaj la bonega kuirado vigligis la interfratecon kaj bonhumoron.

ESPERANTISTA SKIFERIO - Okazos en ADELBODEN (Svislando) de la 27-a de decembro 1968 ĝis la 5-a de januaro 1969. Prezo por la tuta restado svisaj frankoj 130,-. Turnu vin al: ESPERANTO, CH-2314 LA SAGNE. Organizantoj: Claude kaj Andrée Gacond.

## 42-a KONGRESO DE S.A.T.

NOVI SAD (Jugoslavio) de la 3-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1969-a
ORGANIZA KONGRESA KOMITATO. Poŝtfako 184 NOVI SAD (Jugoslavio).
Bankkontoj: Novosadska banka, NOVI SAD. Deviza konto: 657+620/6-3200-109. Dinara konto: 657-620/6-4-12248. KONGRESKOTIZOJ (en U.S.A. Dolaroj): S.A.T.membro: ĝis la 30-4-1969, 7, post la 30-4 ĝis 15-7-1969; 10. S.A.T. geedzoj respektive 12 kaj 16. Junularo, SATmembro, ĝis 20 j. 6 kaj 9. Ne SAT membroj "Gastoj" 10 kaj 15. Subtenantoj, ne partoprenas, 2 dolaroj.
BULTENO N-ro 1
Esperanto societo "Marko Nešić", kaj la Vojvodina Esperantista Ligo, Novi Sad, laŭ decido de SAT-Kongreso en Malmö 1967, elkore invitas vin, partopreni la 42-an SAT-Kongreson en Novi Sad. Ĝi estos la dua SAT-Kongreso, okazinta en Jugoslavio. O.K.K. esperas, ke la Kongreso en Novi Sad restos en via memoro kiel plej agrabla kaj invitas vin kaj viajn amikojn. Venu al la 42-a SAT-Kongreso.

## 54-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO. HELSINKI, 26.VII-2.VIII.1969

SUB LA ALTA PROTEKTADO DE D-RO URHO KALEVA KEKKONEN, PREZIDANTO DE FINNL.
Karavanoj: Italio-I.E.F., S-ro G.Grattapaglia, Via O.Vigliani 15/10, I-10135 TORINO.

## N I   L E G I S

BAVARA REVUO-2a Jarkolekto n-ro 8-9 Aŭgusto-Septembro 1968-a. Eldonas: Sudbavara Esperanto-Ligo (Horst Spirat) 8 München 25, Postfach 546. Redaktas: Gerald Tucker, 8 München 25, Postfach 121.
"PASPORTO"-Broŝuro n-ro 2. Tutmonda Esperantista Junulara Organizo "TEJO"-Ju.Sekcio de U.E.A. Poresperanta Internacia Hominterŝanĝo por individuoj kaj familioj. Oficiala programo de TEJO. Centra Oficejo: Ruben Feldman Gonzalez, Br. Oroño 866 "A" ROSARIO (Argentina).
KATOLIKAJ ARANĜOJ DUM LA 53-a U.K. EN MADRIDO-Mallonga raporto verkita de D-ro Fernando DE LA PUENTE SOLSONA, Prezidanto de Katolika E.Hispana Asocio